РГБ мистика 460

72

7

BIBLIOTEKO
NOVA KULTURO



P. Danov

# La timo

II-a jaro № 9-10

La lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis

Burgas-Bulgarujo

Biblioteko „NOVA KULTURO“

Petro Danov

# LA TIMO
# LA KONDICHOJ de la Eterna Vivo

# 9–10

Burgas — Bulgarujo
1931

# La timo.

„Kaj ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon, sed ne povas mortigi la animon, sed ~~prefere~~ timu tiun, kiu povas pereigi animon kaj korpon en Gehena". 

La timo estas laciga sento de la animo, kiu ekzistas ne nur en la homoj, sed ankaŭ en la bestoj — sento, enmetita en la vivan organismon por plenumi certan mision. Sub la vorto „timo" oni komprenas, ke la medio, en kiu ni vivas, aŭ la kondiĉoj, en kiuj ni ekzistas, estas elementoj kontraŭaj aŭ malbonefikantaj al nia vivo. Tiu sento servas simple por protekti nin kontraŭ ĉio, kio povas nin malhelpi. Kiam aperis la timo en la homoj? Laŭ la ĝenerala koncepto ĝi aperis post la pekfalo. Antaŭ ĝi la homo ne konis la timon. Kaj efektive la timo havas duoblan elmontron: eksteran kaj internan. Kiam iu infano por unua fojo eraris tuj la timo aperas en ĝia animo. Kies animo estas trankvila kaj kvieta, post kiam li faris eraron? Tuj en ĝi aperas la timo. Do, en la animo estas certaj elementoj, kiuj ĝin timigas. La planko de via ĉambro estas farita el lignaj tabuloj. Vi supozas, ke ĝi povas forbruli kaj tuj en vi aperas la timo. Estas, do, certa materialo brulema, metita en via planko. Tiu ĉi sento, estinta en la organisma mondo dum miloj da jaroj, faris la homojn kaj la bestojn sklavoj al la timo. Tamen la timo havas ankaŭ bonan flankon: dank' al ĝi formiĝis la vigleco. La gamboj de multaj bestoj fariĝis longaj pro la timo. Besto, kiu havas longajn gambojn, ĉiam estas timema. Tion vi povas konsideri kiel fakton.

Nun mi ne rakontos al vi detale, kiun rolon ludas la timo en la historio de la evoluo. La nun-

tempaj sciencistoj diras, ke la religio estas rezulto de la timo. Tiu aserto estas neprava, ĉar la religio ekzistas antaŭ la apero de la timo. Kristo, sciante ke liaj disĉiploj estas en tiu kategorio, ke ili ankaŭ timas pri siaj korpoj, diras al ili: „Ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon, sed ne povas mortigi la animon". Kial? Se vi havas certan kapitalon en la banko kaj iu bruligos vian domon, ĉu vi maltrankviliĝos? Ne, ĉar vi konstruos novan kaj pli belan domon. Do, se la kapitalo de via animo estas enmetita aliloke, vi ne timos.

Nun mi pritraktos la duan parton de la verso — kiun ni devas timi. „Timu tiun, kiu povas pereigi la korpon kaj la animon". Pri la dua parto de la verso — kiu estas tiu, kiun ni devas timi — oni longtempe diskutis. Iuj diras, ke tiu, kiun ni devas timi, estas la diablo. Mi diras al vi, ke tiu, kiun ni devas timi, estas Dio, kaj ni devas timi Lin, en senco, ke ni ne afliktu Lin; tio signifas, ke ni estu piaj. Se mi klarigus la Dian leĝon de la vivo, mi ne dirus al vi, kiun vi devas timi kaj kiun vi ne devas timi, sed mi instruos vin, kiel vi devas plenumi la Dian Leĝon. Tio estas la negativa formo de la timo. Kaj la pozitiva formo komencas kiam ni jam pekis; kiu plenumas la Dian volon, li ne timas. Sed tiu, kiu ĝin ne plenumas, ĉiam timas en sia koro kaj neniam li estas libera kaj trankvila. En la tralegita de mi ĉapitro Kristo volas certigi siajn disĉiplojn, ke en la mondo estas certaj leĝoj, kiuj reguligas la homan vivon: „Eĉ la haroj de via kapo estas ĉiuj kalkulitaj, diras Li al siaj disĉiploj". Ne unu haro povas fali vane. Se mi plenumas la Dian leĝon, min protektas Dio, kiel Li protektas la birdojn. La nuntempaj kristanoj malprave komprenas siajn rilatojn al Dio, al la religio kaj pro tio la homa animo suferas multe. La plej valora enhavo de la religio estas la amo al Dio. Se en ni estas tiu fundamenta leĝo, ni estos pretaj fari milojn da aliaj aferoj por Dio.

Kristo diras al siaj disĉiploj: „Ne timu tiujn, kiuj estas sur la tero kaj mortigas". Do, kiuj estas tiuj, kiuj mortigas? Se vi tralegos la unuan verson

vi konstatos, ke estas donita potenco al la malbonaj spiritoj, ke ili mortigu, sed tiu potenco ne koncernas la bonajn homojn, sed nur la malbonajn. La nuntempa kristano volas regi siajn fratojn. Vi vidas, ke Kristo donis aŭtoritatecon al la Apostoloj, ke ili regu ne la homojn, sed la malbonajn spiritojn. Ĉiu el ni devas regi ilin. Kiu ne komprenas tiun Dian Leĝon, ĉiam eraras kaj tiuj spiritoj embuskas lin diversmaniere. La homoj posedas diversajn rimedojn por minaci la spiritojn, sed ili ne timas tion, ili timas nek bastonojn, nek vortojn. Por ke vi havu aŭtoritatecon super iu malbona spirito, vi ne devas posedi ĝiajn malvirtojn. Se vi posedas ilin, negrave ĉu vi estas sciencisto, filozofo, ministro, vi estos ilia sklavo — ili intrigos, reĝojn detronigos, ĉion ili povas fari. Se vi ne havas iliajn malvirtojn, vi estos ilia reganto. Tial Kristo ordonis al la spiritoj. Li estis pura kaj povis ordoni al ili. La malbonaj spiritoj estas tiuj, kiuj malsanigas la homojn kaj resanigas ilin. Vi certe miros pri tio. Tia estas la leĝo. Se vi prunteprenos monon de iu homo, ĉu ne, vi devas redoni ĝin? Se vi vundis iun homon, vi devas pagi por lia resanigo. La diablo faras domaĝojn al la homoj kaj ili vokas Dion, ke Li riparu la domaĝojn. Dio kaptas la diablon kaj diras al ĝi: „Vi difektis la domon de tiu homo, iru kaj riparu ĝin" kaj la diablo penas ĝin ripari. Kaj poste denove Li diras al ĝi: „Se vi volas, denove difektu la domon". Nun kial Dio ne respondas al viaj preĝoj? — Ĉar vi estas pekuloj; kiam venas tiuj laboristoj vi ne povas ilin kontroli kaj ili forkuras. Vi devas havi aŭtoritatecon; kiam Dio sendas ilin, vi devas ordoni al ili, per vipo vi devas regi ilin, ĉar se vi ilin liberigos, ĉiuj ili forkuros kaj via domo restos nekonstruita. Neniam vi devas posedi la malvirtojn de la malbonaj spiritoj. Iuj diras, ke sen malvirtoj ne povas. Se vi ne povas liberiĝi de ili, oni vin mortigos, forprenos vian korpon, monon, oni vin malliberigos — alimaniere ne povas. Nun Kristo diras al ni, kiun ni devas timi. Li diras, ke ni ne devas malobei la Dian Leĝon. La dua parto de tiu klarigo estas la

plenumo de la Dia Leĝo por ke viaj korpoj kaj animoj estu liberaj.

Ĉiu el ni devas revizii siajn koron kaj menson kaj konstati kiaj malvirtoj estas en ili. Se vi emas mensogi, ĉiuj spiritoj de la mensogo estas ĉirkaŭ vi, ili estas viaj gastoj, vi ilin allogas. Se vi emas ĝoji pro la malfeliĉoj de la homoj, tiaj spiritoj estas ĉirkaŭ vi. Kaj se vi estus akrevidaj, vi vidus en via domo tutaj hordoj da ili, ke ili manĝas kaj trinkas. Se vi malamas, ĉiuj spiritoj de la malamo manĝas kaj trinkas je via konto. Jen kial oni mortas. Kiam tiuj spiritoj vizitas vin kaj restas en vi longe, vi komencas plendi, ke vi suferas pro kapdoloro, pro la malsano de la okuloj, de la manoj, de la stomako, de la pulmoj. Tiuj malbonaj spiritoj ĉerpas sukojn el vi, viaj okuloj komencas malfortiĝi, vi komencas blindiĝi, surdiĝi, komencas suferi pro doloroj en la piedoj, en la manoj kaj iun tagon oni vin forportas kaj enterigas. Kaj post kiam vi iros al Dio kun tiuj forŝiritaj vestoj, Li vin demandos: „He, filo, ĉu vi formanĝis ĉion, kion mi donis al vi?“ — „Patro, pardonu, mi manĝis, trinkis, malĉastis, estonte mi tion ne faros“. Tial Kristo diras: „Mi diros al vi, kiun vi devas timi“. Tiu timo estas la prudento. Kiam en la homo kuniĝas la negativa sento kun la pozitiva sento de la singardemo kaj la rezonkapablo, tiam en li aperas la prudento. La timo estas la negativa elemento de la prudento. Sekve, Kristo volas diri: „Ne apartigu tiujn du elementojn unu de alia, ĉar se vi ilin apartigos, t. e. se vi apartigos vian prudenton de la timo, tiel ke ili ne kontrolu unu la alian, sendube vi perdos la korpon kaj la animon.“ Kion, do, signifas la infero? Ĝi konsistas el tiuj limigaj kondiĉoj por la evoluo, kie vi travivos suferojn kaj en vi restos nur la konscio. Kaj ĉu vi konas la staton de la mortinto? Iun tagon vi provos pli senteble tiun staton. Kiam de la mortinto restis nur la ostoj lia animo ĉirkaŭiras ilin kaj parolas, plorante: „Nur tiu trezoro restis al mi; malaperis la stukaĵo“. La brikoj kaj la kaheloj estas tie kaj post certa tempo

tiuj ostoj restarigos la unuan templon kaj pro tio Dio demandas la profeton Jeĥezkel: „Filo de homo, ĉu tiuj ostoj povas reviviĝi?" La profeto respondas: „Vi scias, ho Eternulo!" Dio diras: „Diru tiam, ke la Spirito venu kaj ilin revivigu." Iam Edison faris malgrandan ŝercon al siaj amikoj: li kombinis du skeletojn, movigis ilin aŭtomate, kunligis iliajn piedojn kaj manojn per metalfadeno, metis gramofonojn en iliajn manojn kaj elektrajn lampetojn en iliajn okulojn kaj tiam tiuj du skeletoj — aŭtomatoj komencis paroli: „Iam ankaŭ ni estis kiel vi — ni manĝis kaj trinkis, vidu, kiaj ni fariĝis nun!" Ĉiuj ektimis kaj forkuris. Longtempe Edison admonis ilin, ke tio estas nura ŝerco farita de li. En la nuna nenormala vivo ĉiu homo troviĝas en skeleto, nekapabla labori kaj agi. Tial Kristo diras al siaj disĉiploj: „Ne timu." Por ke ni povu reguligi tiun senton — la timon, — ni entute devas bazi nin sur la Dia Leĝo, sur la koncepto, ke ni estas kunligitaj kun Dio. Iam ni volas vidi Dion, Jesuon Kriston. Vi ĉiutage vidas Lin, kiam en vi ekĝermas la sento de la Amo. Li estas antaŭ vi kaj vi Lin sentas; vi devas nur malfermi viajn spiritajn okulojn, por vidi Lin. Nun vi vidas nur la eksteran flankon de la aferoj, sed ne ankaŭ la esencon. Ĉiu el vi ĉiutage estas en kontakto kun Dio kiam vi suferas kaj amas. Kiam la homo suferas kaj malsanas, Dio lin kuracas kaj bandaĝas liajn vundojn. Farante tion, Li kaŭzas certajn dolorojn kaj la malsanulo plendas. Dio klarigas la kaŭzojn de la suferoj: „Ĉar vi ne plenumis miajn leĝojn, nun vi suferas, sed toleru, Mi vin resanigos". La malsanulo daŭre parolas, ke la doloroj estas netolereblaj. — „Jes, sed kiam mi konsilis vin, ke vi ne malobeu la leĝojn, vi ne aŭskultis Min. Nun vi spertiĝos". De nun vi devas fari provojn — tion faris ankaŭ la antikvaj kristanoj — vi povu apartiĝi de viaj korpoj. Via menso aprobas tion, sed vi devas havi sciojn. Unue vi devas liberiĝi de ĉiuj malvirtoj de tiuj spiritoj, kiuj vin ĉirkaŭas kaj kiam vi eliros el via korpo, vi diros al ili: „Neniu

alproksimiĝu al mia korpo, alimaniere ĝi provos la vipon". Sed se la spiritoj scias, ke vi havas malvirtojn, tuj post kiam vi eliris kaj forlasis vian korpon, ili ĝin forprenos. Tial la nuntempaj homoj estas forte kunligitaj de Dio al siaj korpoj, ĉar, se ili eliros el la korpo, estos ankoraŭ pli malbone por ili, malhelpata estos ilia evoluo. Kristo parolas al tiuj disĉiploj, kiuj volas Lin sekvi, por ke ili komprenu la sekretojn de la Dia Regno. Kaj mi opinias, ke la sekreto de la longa vivo konsistas el tio. Nun mi elmontras al vi faktojn. Ekzemple, homoj, kiuj suferas kaj koleras, kiuj travivas multajn maltrankvilojn, vivas mallonge. Tiuj, kiuj estas trankvilaj kaj ne koleras, ili vivas longe. Tial Herbert Spenser diras ie: „Kiam la eksteraj fortoj de la naturo ekvilibriĝos kun la internaj procedoj de la homa organismo, ni havos eternan vivon en la fizika mondo". Kiuj estas tiuj eksteraj fortoj? — Ili estas la malutilaj elementoj. Kiam ni akiros ekvilibron, kiam ni komprenos kion ni deziras kaj scios kiamaniere kontraŭagi al la malutilaj elementoj, ni povos vivi sur la tero kiom longe ni volas kaj ni povos foriri ankaŭ, kiam ni volos, de ni dependos. Post kiam ni vivis kelkmiljarojn, ni diros: „Sufiĉe ni vivis, nun ni volas fari longan ekskurson en la alian mondon". Tiam nin akompanos niaj parencoj kaj amikoj, kiel oni nun alsendas ĉe la stacidomo. Tio estos vera foriro. Ni estos liberaj, aĉetos bileton kaj foriros kaj niaj amikoj ne marŝos post ni parolante: „Bedaŭrinda homo, la morto lin trafis". Ne. Mi diros al ili, ke mi iros promeni, mi iros viziti mian patran domon, iam eble mi revenos". Kaj ili adiaŭos nin. La kristanismo estas la scienco, kiu devas pretigi tiun vojaĝon, kiu daŭros longe. Ne pensu, ke la loko, kiun ni celas, estas tre proksima; ĝi estas tre proksima, sed ankaŭ tre malproksima. „Proksime" kaj „malproksime" estas aferoj relativaj. Se vi celus atingi la sunon, veturante al ĝi per trajno, al vi estus necesaj 250 jaroj. Sed se vi iros al ĝi per la sunlumo, vi ĝin atingos post 8—9 minutoj. La sunlumo en 9 minutoj trairas 92 — 93 milionojn da mejloj.

Kiam ni parolas pri spaco, ni ĝin komprenas rilate la rapidecon, per kiu ni moviĝas. Se ni ekirus al la plej proksima stelo, Alpha Centauri, ĉu vi scias kiom da jaroj ni bezonas? Por atingi ĝin estas necese, ke ni veturu per trajno en daŭro de 34,000,000 da jaroj. Pere la rapideco de la lumo ni ĝin atingos post 3.000 jaroj. Se vi volas atingi per la rapideco de la lumo la plej proksiman universon, kiu estas kunligita kun la nia, estos necesaj al vi 90,000,000 da jaroj. Do, dependas al kie ni iras. Se vi iras al la suno per la rapideco de la trajno kaj oni vin demandas post kiom da jaroj vi revenos, vi devas respondi: „250 jaroj estas necesaj por atingi ĝin, 250 jaroj mi restos tie, kaj 250 jaroj estas necesaj al mi por reveni, do post 750 jaroj ni revidos nin". Se vi demandos iun, kiu iras al Alpha Centauri, li faros siajn kalkulojn kaj respondos al vi, ke li certe revenos post 100 milionoj da jaroj.

Tiuj estas abstraktaj filozofiaj pensoj, indaj nur por anĝelaj mensoj; vi ne povas prezenti al vi kion signifas 34 milionoj da jaroj; al vi estas necesa anĝela menso por kompreni la majeston de Dio, enmetita en tiu penso. Kaj Kristo diras al siaj disĉiploj: „Ne timu", direktas siajn okulojn al supre kaj aldonas: „Ne timu pri tiuj malgrandaj domoj, kiujn vi havas, ne maltrankviliĝu pri tiuj bagatelaĵoj, ĉar via Patro destinis por vi grandajn aferojn. Zorgu konservi vian animon pura kaj luma; se vi ĝin havas kiel kapitalon, vi povos veturi tra la spacoj." Iun tagon, kiam vi ekiros al la ĉielo, vi ne prenos vian korpon — vi ekiros nur per via animo, la korpon vi lasos sur la tero, ĉar ĝi el tero estas farita. Ĝi estas veturilo, kreita provizore el la elementoj de la tero kaj dum vi estas sur la tero, en la regno de tiuj kvar elementoj de la tero, vi estos en tiu veturilo. Kiam vi atingos montaron, kiun vi devas supreniri, vi lasos la veturilon kaj ekiros piede. Tial Kristo diras: „Ne timu, kiam vi ekiras la montan vojeton, ne perdu vian animon, ĉar tiamaniere vi haltigos vian evoluon.

Vi volas fariĝi estroj; ne, ne fariĝu estroj super

viaj fratoj. La plej granda krimo de la nuntempaj homoj estas tiu, ke ili aspiras regi unu la alian. Vi ne devas ordoni al la homoj; al la malbonaj spiritoj vi povas kaj devas ordoni. Mi volas, ke vi regu iun malbonan spiriton, ke vi ĝin instruu, sed mi ne volas, ke vi ordonu al la homoj. Tion parolas Kristo. Iam vi volas scii, kiu estas pli granda kaj kiu pli malgranda, kiu estas pli maljuna kaj kiu pli juna. Ne gravas ĉu vi estas pli granda aŭ pli malgranda, pli maljuna aŭ pli juna. Certe Dio sendis vin pli frue aŭ pli malfrue. La forto konsistas el tio, ke vi regu la malbonajn spiritojn, ke vi ilin obeigu al via volo. La forto de la homo estas en li mem, tien li devas direkti sian atenton. Ĉiu el vi devas komenci kontroli tiujn spiritojn. Mi scias, ke multaj estas turmentataj de malbonaj spiritoj; multaj iras al Kristo por helpo. Kiel Li helpos al ili? Li ligas la malbonajn spiritojn, la homoj ilin malligas, ilin liberigas. Al tiaj homoj oni ne povas helpi. Ĉu Kristo okupiĝos per vi? Vi ne povas fariĝi estroj de via vivo, ĝis kiam vi ne ekregos tiujn spiritojn.

Sep ŝtupoj estas, kiujn vi devas pasi, antaŭ ol akiri aŭtoritaton super la malbonaj spiritoj. La profanaj spiritoj timas la lumon. La unua afero, kiun vi devas fari, estas jena: vi devas turni vin al Dio. Kio do estas la konvertiĝo? Nun estas turnita via dorso al Dio, en vi estas mallumo; turnu vian vizaĝon al Dio! Sen tiu konvertiĝo al li ne eblas. Kiam vi volas forigi la polvon de iu ajn vestaĵo, vi purigas ĝiajn eksterajn kaj internajn flankojn. Sekve, laŭ la la sama maniero vi povas purigi viajn koron kaj menson.

La dua necesa afero estas la pentofaro, la bilanco, la likvido de la konto. Vi metas anoncon super via firmo: „Mi ne funkcias, mi faras mian jaran bilancon“. Vi faras la konton kaj la bilanco montras, ke vi ŝuldas. Nenion alian vi povas fari ol peti viajn kreditorojn, ke ili atendu, ĝis kiam vi povos pagi al ili. Vi malfermos viajn kontlibrojn kaj diros al ili: „Mi estas honesta homo, sed iel mi perdis,

vi pardonos min, ankoraŭ dum kelka tempo vi atendos min kaj pruntedonos al mi". Se vi ne petos, ili povas malliberigi vin. Post kiam vi faris vian bilancon kaj ili certiĝis, ke vi estas honesta, ili diros al vi: „Longe ni negocis kun vi, ni vin pardonos kaj ree ni donas krediton al vi".

La pardono kaj la saviĝo estas du kunligitaj aferoj. Tio, kion ni nomas saviĝo en la kristanismo, okazas post kiam ni pasis la du periodojn: tiun de la turniĝo al Dio kaj tiun de la pentofaro. Kristo diras: „Mi donas novan krediton al vi kaj mi resendos vin en la mondon, ke vi laboru". Denove vi komencas funkcii kiel komerca firmo.

La kvara ŝtupo estas la regeneracio. La regeneracio mi klarigos per jena procedo. Iu agrikulturisto posedas ĝardenon, elradikigas la fruktarbojn kaj plantas novajn. Kiam komencos kreski la novaj pomarboj, tio jam estas regeneracio; li esperas, ke la nova ĝardeno denove donos fruktojn al li. Ankaŭ en la kristanismo, post kiam pasis tiu procedo, okazas en ni la regeneracio — la novo komencas ĝermi kaj kreski. La regeneracio estas procedo de florado kaj fruktodono. Estas pentofaro, pardono, saviĝo, regeneracio kaj novenaskiĝo — la kvina ŝtupo. Poste sekvas la superaj procedoj, la konsekriĝo — la leĝo de la supera saĝo kaj la leĝo de la supera Amo kaj la servo al Dio aŭ la apliko de la leĝo de la Vero.

En la novenaskiĝo la homo liberiĝas de la karma leĝo de kaŭzoj kaj postsekvoj. Tiam vi estos liberaj civitanoj, neniu povos estri vin. Nur en tiu kvina ŝtupo vi povas estri la malbonajn spiritojn; nur kiam vi okupos la lokon de Kristo, vi povos ordoni al ili. Tiam vi estos disĉiplo de Kristo. Kaj tiu estas speciala honoro por vi. Li donis aŭtoritaton al siaj disĉiploj, ke ili regu la malbonajn spiritojn kaj ilin sendis en la mondon resanigi kaj revivigi ja homojn. Kial povas esti donata tiu aŭtoritato al homo, kiu apenaŭ konvertiĝis kaj ankoraŭ ne likvidis sian konton? Ankoraŭ oni lin ne pardonis, ankoraŭ li ne renaskiĝis kaj li volas regi la mondon! Tio ne eblas. Vi volas ordoni al la malbonaj spiritoj. Tio ne povas

esti. Vi devas pasi tiujn kvar ŝtupojn kaj post tio vi estos estroj en la plena senco de la vorto. Nun vi rezonas pri tio, sed denove vi timas, vi ne estas certa, ĉu vi posedas virton aŭ ne. Ekzistas du ekstremoj en la kristanismo: iuj sin montras pli humilaj ol en efektiveco ili estas kaj iuj sin sentas pli pekaj ol ili estas. La du kazoj estas ekstremaj. Se oni volas elprovi vin, ĉu vi estas firma, ĉu vi havas paciencon kaj rezignon, oni povas submeti vin al diversaj elprovoj kaj vi devas ilin travivi; tamen se de Dio ne estas permeso, la tuta mondo povas esti kontraŭ vi, sed neniu povos malutili vin. Iu anglo faris veton kun alia anglo, kiu havis 40 hundojn de la raso „Buldog" kaj kiu parolis, ke pli kruelaj hundoj ol liaj ne estas kaj ke neniu povas alproksimiĝi al ili. La unua anglo faris veton ke li alproksimiĝos al ili kaj ili nenion faros al li. Li desegnis cirklon ĉirkaŭ si kaj la posedanto de la hundoj liberigis ilin. Ili komencis ĉirkaŭiri la cirklon, sed neniu el ili povis ĝin transpasi. Plej poste la anglo, kiu estis en la cirklo ekfajfis laŭ neordinara maniero kaj la hundoj forkuris. Li posedis certan forton. Li pelis ilin nek per pafilo, nek per bastono. Li posedis certan forton, kiun li uzis, tial ili forkuris. Mi demandas, kie estas via forto? Iun tagon certe iu malbona spirito minacos vin per siaj hundoj. Sed se vi posedas tiun forton vi desegnos cirklon ĉirkaŭ vi kaj post via ekfajfo ili tuj forkuros. La forto estas en tiu dia fajfilo kaj kiu ĝin posedas, estas ĉiam libera kaj aŭtoritata.

Nun vi konas la metodon estri la malbonajn spiritojn, tial vi ne devas posedi iliajn malvirtojn. Se vi timas, ĉiuj spiritoj de la timo estas ĉirkaŭ vi. Pro tio forĵetu ĉiujn malvirtojn el vi. Vi asertas, ke vi ne timas plu, sed en la sekvanta tago vi denove ektimas. Plenumu vian intencon, sed ĝin al neniu sciigu. „Mi intencas planti arbojn," diras iu, sed ankoraŭ nenion mi plantis. Plantu kaj tiam alvoku viajn amikojn, ke ili vidu, kion vi plantis. Ili ĝojos pro tio. Vi diras: „Mi decidis fariĝi bona, venu kaj vidu mian planon, tion mi intencas fari, alion mi

intencas fari" Mi diras, ke nenion vi faros. Mi vidis milionojn da planoj — la tuta infero estas plena je planoj. Vi projektas fari ion, parolu nenion pri ĝi. Nur petu, ke Dio helpu al vi. Kaj post kiam la arboj en via fruktoĝardeno elkreskis kaj donis fruktojn, alvoku ĉiujn viajn amikojn kaj diru al ili: „Manĝu, trinku kaj ĝoju!" Tiam Dio vin benos. Jen tio estas la Kristanismo.

En la Sankta Skribo estas dirite, ke en tiu ĉi mondo ni estas enmigrantoj, ke tiu korpo, en kiu nun ni estas, ne estas nia. Dio nin sendis por ke ni ekregu ĝin perforte. Kaj vi volas ĝin ekregi. Unue vi devas ekregi la spiritojn kaj poste la eksterajn elementojn, ĉar ĉiu elemento havas sian estron. Vi ne povas esti estroj de la akvo, se vi ne ekregos la spiritojn de la akvo; vi ne povas esti estroj de la aero, se vi ne fariĝos estroj de la spiritoj de la aero; nek vi povas esti estroj de la fajro, se vi ne fariĝos estroj de la spiritoj de la fajro ktp. Sekve, Kristo donas al ni leĝon, laŭ kiu ni devas agi: unue ni devas esti puraj kaj tiam ni turnu nin al Li. Nun, ĉar Kristo venas en tiun mondon, en kia stato Li trovos vin? Kompreneble, iuj estos riĉaj, aliaj malriĉaj. Estas dirite: „Se iu konstruos sur tiu ĉi fundamento ion per oro, arĝento kaj maltekostaj ŝtonoj, ligno, fojno, pajlo, ĉies laboro estos elprovata; kies konstruaĵo ne rompiĝos, tiu ricevos rekompencon kaj kies konstruaĵo forbruliĝos, li perdos kaj li mem saviĝos, sed kiel el fajro. „Kaj ĉiu, kiu ne atentas la ĉastecon kaj ne timas Dion, tian homon oni transdonos al Satano por pereigo de la karno, por ke saviĝu lia spirito en la tago de la Disinjoro Jesuo". Se vi akiris spertojn, se vi suferis, levadis alten la standardon de la Vero, se vi ne timis tiujn, kiuj pereigis la korpon kaj se vi oferadis por la sukceso de la Dia Regno, Dio revivigos vin. Kaj Kristo diras: „Ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon". Se oni mortigos vian korpon, via animo liberiĝos kaj tio estas la valoraĵo de la vivo. Ĉiu alia vojo, kiu deflankigos vin de la Vojo de la Vero, estas pereiga, kiel por via korpo, tiel ankaŭ por via animo.

Ĉar la timemaj, la malgrandanimaj ne heredos la Dian Regnon. En la Vera laboro de Dio, en la vera laboro de la homaro, de la nacio, de la socio, de la familio, de la individua animo devas esti nek timo, nek hezito, nek mallarĝanimeco, nek oni devas cedi de la granda principo de la vivo. La vero estas ĉiam Vero. Amo kaj timo estas neakordigeblaj aferoj en la homa spirito, en la spirito de la vera homo. Tie, kie estas la amo, la timo forestas; kie estas la timo, tie la amo forestas. La Amo estas signo de pleneco, de unueco en ĉiuj fortoj, sentoj kaj kapabloj de la homa animo; kaj la timo estas signo de foresto, de nuligo de tiu interna harmonio de la spirita mondo.

Per tiuj lastaj vortoj mi komprenas la superon, la noblon, la bonon en la homo. Mi ne komprenas tiun arogantecon, tiun malĝentilecon, tiun ŝtonkorecon, kiujn ofte oni traktas kiel kuraĝon kaj sentimon. La idealo de la heroeco konsistas el la jeno: kiam oni vin metos sur la malhonora kolono pro la Vero, vi per grandanimeco travivu ĉiujn suferojn, la tutan malhonoron, ĉiujn insultojn kaj ĉiujn mizerĝojojn kaj kulpigojn de la ĉirkaŭantoj kaj eĉ de la tuta mondo kaj vi diru al via Patrino: „Por Vi, kiu min naskis en tiu ĉi Dia mondo, mi ĉion oferas. En Via Amo mi trovas la lastan apogilon por mia animo. La timo pro la mondo, pro tiuj, kiuj mortigas la korpon, jam travivis sian tempon. Mi ne timas, ĉar mi Vin konas. Ĉu mi mortos aŭ ĉu mi vivos, egale per danko mi ĉion akceptas. Kun Vi ankaŭ en la morto estas senco: sen Vi ankaŭ en la vivo ne estas senco. En la morto kaj en la vivo estu Vi la luma Krono por mia Spirito“.

Prelego farita je la 19. 10. 1914 en Sofio.

# La kondiĉoj de la Eterna Vivo.

„Kaj jen estas la eterna vivo, ke oni ekkonu Vin, la sole Veran Dion kaj Tiun, Kiun Vi sendis, Jesuon Kriston".

Kiam la juna bulgara fraŭlo, pura kiel la roso, renkontas por unua fojo sian idealon, sian amatinon, li haltas kaj diras: „Jen, mi trovis ŝin. Nun mi, kiel Arhimed, povas difinì la relativan pezon de la objektoj, difini kiom da arĝento, kiom da kupro, kiom da oro estas entenataj en tiu ĉi reĝa krono. Nun mi kiel Newton povas diri, kial la pomoj maturiĝas kaj falas, kial la ŝtonegoj ruliĝas de supre, kial la torentoj malsupreniras, saltas, bruas kaj rapide fluas, kial la astroj en la spaco moviĝas kaj rondiras ĉirkaŭ siaj centroj. Nun mia menso, mia koro malkovras al mi la grandan sekreton de la movo de la vivo; mi povas diri al vi el kio konsistas la eterna vivo; mi povas priskibi al vi ĝiajn ecojn, kondiĉojn kaj elementojn. Mi ilin trovis, mi trovis la filozofian ŝtonon, mi akiris la valoran eliksiron de la vivo. Mi povas esti kuraĝa kiel leono, tolerema kiel bovo, fluganta kiel aglo, racia kiel homo". Kaj vere estas dirite: „Dio malkovris Lin al la junuloj". — Tiu junulo ne estas malproksime de la vero. Li komprenis la originalan lingvon, en kiu Dio parolas Liaj deduktoj kaj komprenoj montras, ke li komprenas la originalon, el kiu li ĉerpas sian inspiron, li parolas, pensas, sentas, agas korekte: gramatike, logike kaj filozofie. En lia animo estas paco kaj konsento, ne estas kontraŭdiro pri la vorto „eterna" — ĉu ĝi estu metita antaŭ aŭ malantaŭ la vorto „vivo". Tio estas la ekstera ŝelo de la aferoj, li diras. „Por mi

gravas, ke la eterna vivo en mia menso, en mia koro, estu enpenetrinta profunde en mian animon kaj fortigu mian spiriton per sia Dia fajro".

Vera estas lia respondo. Antaŭ certaj jaroj regulo estis, ke la kaleŝisto sidu sur la antaŭa parto de la kaleŝo kaj la sinjoro — sur la malantaŭa. Pli poste la regulo aliiĝis: la sinjoro sidas sur la antaŭa parto kaj la kaleŝisto sur la malantaŭa. Antaŭe aŭ malantaŭe estas egale, nur la bridoj de la ĉevaloj estu en spertaj manoj, la ĉevaloj kaj la kaleŝo estu fortaj, la kaleŝisto — konjektema, la sinjoro — saĝa kaj bona kaj oni sukcesas en la atingo de la celo. Iu certe demandos: „Kion vi volas diri per tio?" — Simple kaj klare, ke la sinjoro kaj la kaleŝisto okupu siajn ĝustajn lokojn. Ĉu vi povas diri kiel tiu fraulo: „Mi trovis mian amation". Jen la grava problemo por vi. Kiam vi solvos ĝin, la mondo kaj la vivo akiros alian aspekton. Sed ni revenu al la temo. Kiam Kristo eldiris tiujn vortojn pri la eterna vivo en la ĉeesto de siaj disĉiploj, li malkovris al ili grandan leĝon de la vivo — leĝon per kiu apartiĝas kaj difiniĝas du esencaj elementoj de la vivo, kiuj troviĝas en la ordinara kaj en la eterna, en la konscia kaj en la supersenta vivo. Nun, tiuj, kiuj ne komprenas la profundan sencon de la primitiva lingvo povas diverse komentarii miajn dirojn, dislokigi la vortojn; sed estas certaj leĝoj, kiuj reguligas la homan penson kaj kiuj ne permesas arbitran dislokigon de la vortoj. Ĝis kiam la homo ne spertos pensi korekte, li eraros kaj siajn erarojn li elaĉetos per multaj suferoj. Ĉio skribita en la granda libro de la vivo estas por la raciaj estaĵoj, ĝi ne estas por la pli malsupraj estaĵoj, kiuj ne komprenas tiujn leĝojn. Nun, se iu legos la esprimon „eterna vivo" aŭ „vivo eterna" li demandos, kion oni povas kompreni de la vorto „eterna". Tiu ĉi vorto havas eksteran kaj internan sencon. De la esprimo „eterna vivo" oni nun komprenas: longan, senliman, senfinan vivon. La radiko de la vorto eterna devenas de la sanskrita lingvo kaj signifas tero kaj tero san-

skrite signifas estaĵo, kiu gravediĝas kaj naskas. Ofte oni intermiksas la eternan vivon kun la ekzisto de la homo; sed la homo povas ekzisti kaj tamen ne vivi. La metafizikistoj diskutas pri tiu problemo, sed kiam ni eniros en la regionon de la praktika filozofio por provi la Diajn leĝojn, niaj konkludoj devas baziĝi sur la vero kaj la rezultoj estu korektaj.

En la homa vivo estas tri elementoj, kiuj neniam ŝanĝiĝas — tri gravaj principoj, sur kiuj baziĝas lia nuna vivo. Ili estas akceptitaj en la gramatiko, en la logiko kaj en la matematiko. Ekzemple, kiam la infanoj unue lernas la strukturon de la frazoj, oni diras al ili, ke la frazoj havas subjekton, predikaton. En la frazo povas esti ankaŭ atributo, komplemento ktp., sed la fundamento estas en tiuj vortoj, kiuj esprimas la penson. Se mi demandus vin, kio estas la subjekto, vi respondus: „La vorto, kiu difinas tion, pri kio oni parolas en la frazo". Kaj predikato? — „La vorto, kiu difinas, kion faras la subjekto en la frazo". Bone. Se iu instruisto igos vin analizi gramatike la tralegitan verson, montri la plej gravajn vortojn en ĝi, ĉiuj fiksus la vortojn: „Dio kaj Jesuo Kristo". Sed tie ĉi la fundamenta penso estas la eterna vivo, kaj Jesuo Kristo estas komplemento de tiu ĉi penso. Dio kaj Jesuo Kristo estas la principoj el kiuj devenas la eterna vivo, aŭ la du kolonoj sur kiuj sin apogas la eterna vivo. Logike dirite: Dio estas la granda premiso, Jesuo Kristo — la malgranda premiso, kaj la eterna vivo — la konkludo. Ni klarigu tiun ĉi penson pli bone: La vortoj „eterna vivo" temas pri la racia movo de la animoj; la vorto „Dio" — pri la ĝermoj de la spirito, pri la kondiĉoj, fortoj, leĝoj en la naturo, pere de kiuj kreiĝas kaj sur kiuj sin apogas tiu grandioza ordo de la aferoj; kaj „Jesuo Kristo" estas la racia principo, kiu devenas de la unika Dio kaj Li gvidas kaj gardas ĉiujn vivajn estaĵojn. Nun vi certe pensos, ke vi jam komprenas, ke vi jam scias, kio estas efektive la eterna vivo. Sed kia estas la fundamenta elemento de la kono? Ni konas nur tiujn

aferojn, kiujn ni povas provi, kiujn ni povas fari. Ĉiun ajn aferon, kiun ni ne povas provi kaj fari, ni ne konas. Pri similaj aferoj ni havas nur certan ideon kaj ni povas nur konjekti pri ili. Se oni donos al vi ŝtofon, vi diros, ke vi scias, kiel oni faris ĝin. Sed kiam oni igos vin fari ĝin — ŝpini la lanon, vi diros, ke vi ne scipovas fari tion.

La scienco asertas, ke al ĉiu viva estaĵo, por ke ĝi povu vivi, necesas medio kaj kondiĉoj. Ekzemple, la medio de la fiŝo estas la akvo. Kion ni devas kompreni sub la vorto „medio"? La unua elemento de la eterna vivo estas tiu, en kiu la animo estas trempita, kiel la fiŝo — tiun ĉi elementon ni nomas medio. Kiam ni komencas konstrui domon, tiun medion ni nomas fundamento — sur la fundamento ni konstruas la murojn kaj sur ilin ni metas la tegmenton. Kiam ni plantas kreskaĵon, tiun medion ni nomas grundo. — En la grundon ni semas diversajn semojn. Unue en ĉiu afero ni devas trovi la medion. Kio estas la medio en la eterna vivo? — Dio. Sed ekzistas ankaŭ aliaj du transitivaj elementoj aŭ kondiĉoj. Iuj miksas la signifon de la vorto „kondiĉo" kun tiu de la vorto „medio". Inter ili estas diferenco. Por ke la vagonaro iru de unu stacio al alia, devas esti certaj kondiĉoj; ili estas fervojo, karboj kaj akvo. Kaj kiuj estas la kondiĉoj de la homa vivo? La medio, en kiu la homo vivas, estas la aero. La homo troviĝas en ĝi. Sed la aero ne estas la unika elemento necesa por la ekzisto de la homo, de la fiŝoj kaj de la birdoj; ekzistas dua elemento — la nutraĵo; tamen ni ne estas trempitaj en la nutraĵo; tiu ĉi elemento estas transitiva, venas de ekstere, eniras nin, eliras el ni, kaj donas siajn rezultojn. La tria elemento por la subteno de la vivo de la homo estas tiu, en kiu la fiŝo estas trempita — la akvo; ĝi estas medio por la fiŝo kaj por la homo estas nur kondiĉo. Se ni metus la homon en la akvon, en kiu troviĝas la fiŝo, li mortus. Por la fiŝo la aero estas kondiĉo. Tiu ĉi kondiĉo troviĝas en la akvo mem kaj kiam ĝi pasas tra la brankoj de iu fiŝo, tiu aero eniĝas en ĝian spirsistemon

kaj purigas la sangon. Medio por la fiŝo estas la akvo. Medio por la homo estas la aero.

Sed la medio prezentas nur trionon de la vivo. Kie aperas la malveraj komprenoj? Kiam ni uzas analogie certan ekzemplon, ni devas scii kiom da vero estas en ĝi. Ĉiam ni devas esti sinceraj kaj ne nur niaj konkludoj devas esti veraj, sed samtempe ankaŭ la premisoj devas esti veraj. Se unu el viaj premisoj ne estas vera, via tuta konkludo estas nevera. Kaj kiam la matematikistoj kaj la inĝenieroj faras certajn kalkulojn por iuj konstruaĵoj, ili antaŭvidas ĝuste ĉiujn cirkonstancojn por eviti eblajn erarojn. Laŭ la sama leĝo vi devas ordigi ĉion en vi, kiam vi volas krei vian karakteron — vian koron kaj vian menson. Vi devas scii kiamaniere krei ĝin — vi sciu kio estas medio, kio — kondiĉo kaj kio — elemento. Ĉar estas ankaŭ elementoj. La elementoj koncernas la subtenon de la vivo kaj la kondiĉoj — la ekziston de la vivo. Ekzemple, la grenkampoj, la ĝardenoj, la vinberĝardenoj ktp. formas kondiĉojn por la subteno de la vivo, de kiuj devenas la elementoj de la vivo: la greno, la fruktoj ktp. La lumo estas necesa elemento por la vivo, sed ĝi estas kvara elemento — la aero, la nutraĵo kaj la akvo estas la unuaj tri elementoj. Se la fiŝo dirus: „Por mi sufiĉas la akvo, ĉar en ĝi troviĝas mia nutraĵo" kaj se la homo dezirus vivi ankaŭ en la akvo, li trovus sin en kontraŭdiro kun la fundamentaj leĝoj, kiuj reguligas lian vivon, ĉar li ne povas eniri en la akvon, kiel la fiŝoj. De tiuj, nome, malpravaj vivkonceptoj devenas la eraroj en ĉiuj nuntempaj filozofioj kaj religioj En ili estas multaj dogmoj, kies la pli granda parto ne estas vera.

Ni ree pritraktu la vorton „eterna". Ĝi koncernas la spiritan mondon, la materialojn, el kiuj ni povas konstrui la senmortan vivon. La vorto vivo signifas la organisman vivon en la materio, kiu kreskas kaj disvolviĝas kaj ne povas esti senfina, eterna; ĝia formo povas ŝanĝiĝi kaj tiun ĉi ŝanĝon ni nomas morto. Tamen la ideoj pri la morto estas diversaj.

La morto ne signifas, ke la homo perdas sian konscion, sed ke li perdas tiujn kondiĉojn, ĉe kiuj sin elmontras la vivo. La konscio restas tiel, kiel restas la ostoj post la morto de la homo. La konscio estas la spirita vertebraro de la homo. Do, sur tiu vertebraro, kiel sur la homa vertebraro estas bazita la tuta nerva sistemo kaj membraro, kiuj funkcias kune kun la ceteraj sentoj kaj kapabloj. Dio estas la supera forto aŭ la necesa medio, en kiu la homo estas enmetita spirite. Ni klarigu tiun ĉi analogion. Kiam ni diras, ke la lumo estas necesa por la homa okulo, tio signifas, ke la ĉeloj de la okuloj estas trempitaj en la lumo, ke ĝi estas necesa por ilia subteno. La homa animo devas esti same trempita. Se vi ne trempis ĝin, vi estas ekster via medio, vi vivas kiel embrio, kiel multaj tritikaj greneroj, kiuj estis en la egiptaj piramidoj dum 5 — 6 miloj da jaroj en seka loko kaj atendis kondiĉojn, por ke ili estu semataj kaj tiamaniere ekĝermu. Tiajn trítikajn grenerojn lastatempe oni trovis kaj semis kaj ili donis bonegan rezulton. Ankaŭ la homa animo, kiel tritika grenero en la Dia grenejo, atendas tiujn tri necesajn elementojn, kiuj estas en la kondiĉoj, en la fortoj kaj en la leĝoj, por ke ĝi povu rekomenci sian vivon. Aŭ dirite en la senco de la kristanismo, ni devas trovi la kondiĉojn, ĉe kiuj ni povas vivi en Dio. Tien devas esti direktita la peno de ĉiu konscia homo, por ke li povu atingi tiun ĉi staton. Vi vivas, vi ekzistas, sed tiu vivado kaj ekzistado estas simpla vegetado. Via ekzisto konsistas nur el unu elemento kaj ĝin limigas la Dia Esenco, kiu vin kreis kiel tritikajn grenerojn kaj fruktajn semojn. Vi ne povas eviti vian ekziston, vi ne povas pereigi vin mem. Via vivo estas ekster la tempo kaj la spaco. La homa animo en tiu stato travivis miliardojn da jaroj en la sinoj de la Dia konscio, sed la tiama ĝia vivo estis de alia stato: ĝi ne sentis sin kiel individuon, ĝi ne konis la apartan vivon de la individua spirito, ĝi vivis en la Dia beato, en dormema stato. Sed nun, post sia revekiĝo, ĝi venas sur la teron por ellerni la internan sencon de tiu vivo, akiri mem

propran senmortan vivon kaj fariĝi civitano de la Ĉielo kun fiksitaj rajtoj kaj devoj. Tiu ĉi interna impulso estas kondiĉo donita al ĝi de Dio. Nun iuj volas enkarniĝi kaj samtempe vivi kiel Dio. Tio estas kontraŭdiro, ĉar se vi volas vivi kiel Dio, ne estas senco ke vi eliru el Li. Ĉu estas senco, ke tiu Dia konscio apartiĝu kaj serĉu ian ajn alian vivon? Tio pruvas, ke la homa animo ĉiam ekzistas en Dio kaj ĝia interna impulso estas serĉi Lin en ĉiuj liaj elmontroj kaj Lin imiti.

Ni denove priparolu la sciencan flankon de la ekposedo de tiuj tri fundamentoj: medio, kondiĉoj kaj elementoj por la ekzisto. En la eklezio tiu ĉi ideo estas esprimita per la vorto: „tripersoneco de Dio". Kion signifas tio ĉi? — Tri diversaj estaĵoj, kiuj havas identan penson, identan volon — Patro, Filo kaj Sankta Spirito. La medio por ĉiuj estaĵoj kaj por nia animo estas Dio; la elemento, kiu portas vivon en si, estas Kristo kaj la kondiĉoj, kiuj helpas la evoluon de la vivo estas en la Sankta Spirito. Kiam vi ŝanĝas la ordon de la aferoj, vi devas ŝanĝi samtempe ankaŭ la leĝojn, kiuj reguligas la formojn. Vi povas trempi vin en la akvon, sed por ke vi vivu en ĝi, vi devas ŝanĝi ankaŭ vian homan formon en fiŝan. Tio estus degrado de la vivo, ĉar en tiu kazo vi transformos la kondiĉon — la akvon en medion. Kaj la vivo supreniĝas, kiam vi transformas la medion en kondiĉon. En la unua kaj en la alia kazo la formo de la estaĵo laŭ neceso devas ŝanĝiĝi. Ni povas ŝanĝi la formon de iu fiŝo nur kiam ni ŝanĝos ĝian medion. Se iom post iom ni eligas ĝin el la akvo kaj ĝin metas en la aeron nepre ŝanĝiĝos ĝia tuta organismo, ĝi fariĝos birdo, ĝi alkonformiĝos al la aero. Tiam la akvo fariĝos kondiĉo por ĝia ekzisto, kiel por ĝi estas kondiĉo la nutraĵo kaj la lumo. Kiam Kristo diras „kaj eterna vivo estas tio — ekkoni Vin, la Unikan Veran Dion", kion Li volis diri per tiuj vortoj: „ La Unika Vera Dio ". — Tiu Supera Forto, kiu konstante moviĝas en ni, Kiu portas la vivon en si, kreas la kondiĉojn, per kiuj ni povas Ĝin ekkoni. Estaĵo, kiu estas metita en

certa medio, ne povas ekkoni ĝin, ekzemple, la fiŝo ne povas ekkoni la akvon, en kiu ĝi estas. Iuj volas ekkoni Dion; se vi estas en Li, vi Lin ne ekkonos, ĉar vi estas en Li. Vi devas apartiĝi de Li, fari Lin kondiĉo por via ekzisto, se vi volas Lin ekkoni. Ni supozu, ke vi parolas al iu ĉelo, kiu loĝas en vi. La homaj ĉeloj estas raciaj estaĵoj, ili havas certan specifan inteligentecon. Ili estas kiel la birdoj kaj la fiŝoj. Tio certe ŝajnos al vi mirindaĵo, sed tiel estas. Vi povas fari provon paroli al ili kaj tiuj ĉeloj vin komprenos kaj kiam vi parolos al ili ilian lingvon, ili plenumos sian devon. Ekzemple, se iu ĉelo dirus: „Mi volas ekkoni kio estas la homo", tio estus la sama, se la homo dirus, ke li volas provi, kio estas Dio. Tiam Dio ne devas esti kondiĉo, la homo devas apartiĝi de Li. Sed ĉu eblas? Tio estas ebla, sed vi devas ŝanĝi vian formon. Ankaŭ la ĉelo, por ke ĝi povu ekkoni kio estas la homo, devas travivi miliardojn da kondiĉoj, ĉiujn statojn, ĝi devas esti en la stomako, en la koro, en la pulmoj, en la cerbo ktp. kaj nur tiam ĝi povas diri, ke ĝi jam formis sian opinion pri la homo. Kaj nun, ni — la filozofoj de la nuntempa mondo, kiuj trairis ĉion, diras: „Venu, ke mi rakontu al vi, kio estas Dio; — Li estas ĉiopova, ĉu vi nun komprenis?" — „Jes, mi komprenis". Nenion vi komprenis. Nur post kiam vi eliros ekster tiu ĉi medio tra la pordo nomata „morto", kiam vi „mortos" nur tiam vi ekkonos, kio estas Dio. Tial nome la homoj „mortas". Kaj kiam en iu animo aperos la deziro ekkoni Dion, ĝi devas „morti", dirante: „Mi devas morti, por ekkoni Dion" — tio estas la plej prava difino de la Dia kono. Tiuj, kiuj skribis la Evangelion, estis homoj tre saĝaj. Iuj opinias, ke la Evangelistoj, kiel fiŝkaptistoj, estis malkleraj kaj ke ankaŭ Jesuo Kristo estis malklera. Tamen, tio tute ne estas vera. Kristo studis en la ĉiela lernejo. Li ne bezonis studi sur la tero. Mi miras pri tia supraĵa konkludo; ĉu homo, kiu tute ne studis, povas konverti la mondon kaj alkonduki la homojn al Dio? La materialistoj, la panteistoj diras: „Vi — la kristanoj, estas grandaj malsaĝuloj, vi ne

havas logikon; vi esperas, ke homo, kiu estis simpla, malklera, povas alkonduki vin al Dio". Iu, predikante iam en la preĝejo, ke Kristo per kvin panbuloj kaj du fiŝoj nutris kvin mil homojn — por ke li faru tiun mirindaĵon akceptebla por la aŭskultantoj, aldonis: „Ne pensu, ke tiuj panbuloj estis ordinaraj — ne, ili estis grandaj kiel montetoj." Kiam aŭdis tion iu ŝafpaŝtisto, li ekfajfis per buŝo kaj diris al li: „Kial vi parolas tiel? Mi ne miras, ke la panbuloj estis tiom grandaj, sed mi ja miras pri la pordoj de tiuj bakejoj, en kiuj oni bakis tiujn panbulojn." Jen tio estas nelogika supraĵa rezono. La unua afero, kiun la kristano devas fari, estas ke li liberiĝu de ĉiuj malveraj konkludoj, pensoj, deziroj. Kaj li povas fari tion. La logika homo povas tuj liberigi sin de ili. Kaj la lernanto povas provi kiom vera estas ekzemple la aserto, ke la homo estas estaĵo kun du piedoj, ke ĉiu estaĵo kun du piedoj estas homo; ĉu sekve, ankaŭ la kokino, kiu estas dupieda, estas homo? La konkludo estas tre korekta, sed nome, ne la du piedoj karakterizas la homon. Tio, kio karakterizas la homon, estas lia menso, lia koro kaj lia animo. Tio estas tri elementoj. La piedoj aŭ la manoj estas nur ekstera fizika produkto necesa por la homa agado. Kiam la homo devas agi, li devas havi manojn kaj piedojn. La kondiĉoj ilin kreas. Vi demandos, kiaj ili estos. Ili korespondos al la medio. Ni diras, ke certaj organoj ne povas ŝanĝiĝi, ĝis kiam la estaĵo vivas en unu kaj sama medio. Ekzemple, pri la fiŝo ni diras, ke la naĝiloj, per kiuj ĝi naĝas, estas necesaj al ĝi, por ke ĝi naĝu en la akvo kaj ke ili ne povas ŝanĝiĝi; tamen se la fiŝo eliros ekster la akvo, se ĝi povas fari tion kaj ekintencos fariĝi homo, ĝiaj naĝiloj devas transformiĝi en manojn kaj piedojn. Ni, kiuj volas transiri en la spiritan mondon, estas kiel la fiŝoj, metitaj en certan medion. Se ni volas koniĝi kun tiuj kondiĉoj, en kiuj vivas la anĝeloj, ili diros al ni tiel, kiel ni diros al la fiŝoj, se ili volas eliri ekster la akvon kaj eniri en nian medion por pensi kaj agi: „Unue vi devas alkonformigi viajn brankojn,

krei pulmojn, per kiuj vi spiros. Nun mi rekomendos al vi tiun ĉi instruon — ke vi faru al vi pulmojn por la alia mondo, ĉar se vi ilin ne posedas, vi ne povos eniri ĝin. Vi devas esti pretaj, por ke via vivo daŭru eterne supre, post kiam vi forlasos la teron.

La mondo de la spiritoj, de la anĝeloj, kiun iuj nomas astrala mondo, estas ligilo inter la fizika kaj la spirita aŭ la Dia mondo. Tiu, kiu parolas, estas Dio — Li estas la predikato, la fonto de scio, forto kaj vivo; la homo estas subjekto, la grundo, kiu preparas la sukojn de la vivo, kaj la spiritoj, la anĝeloj kunligas la fizikan mondon kun la spirita kaj ili aplikas la leĝojn de harmonia kontakto de tiuj du mondoj. La anĝeloj donas al ni la konon pri Dio, sen Kiu ni povas havi nenian vivon en ni. Mi citos al vi la jenan komparon. Supozu, ke vintre dum nokto vi eliras eksteren kaj tremante ekstaras kontraŭ la luno. Iu vin demandas, kial vi sidas tie. Vi respondas, ke vi varmigas vin. Li daŭrigas siajn demandojn: „Sed ne estas suno". — „Vi estas blinda homo, vi trompas vin, tiu suno iom post iom varmigos min". Kiam vi ne havas veran prezenton pri Dio, tio pruvas, ke inter vi kaj Dio estas certa abismo, certa baro, kiu rompas la ligon inter via vivo kaj la Dia. Nun mi rimarkas, ke en tiu ĉi parolo estas io malklara por via menso. Se mi rakontos al vi pri la muziko, mi diros, ke la homo povas percepti per sia orelo en sekundo plej multe 32 — 46 milojn da vibroj de la sonondoj. La lumo elmontras sin kiel ruĝa radio, kiu produktiĝas en nia okulo de 428 bilionoj da vibroj en ĉiu sekundo. Supreniranteı tiun ŝtuparon, inter la ruĝaj kaj la violkoloraj radioj estas 739 bilionoj da vibroj en unu sekundo. Nia parolo povas esti logika nur tiam, kiam ni limigas nin en la malgranda cirklo de la aferoj, kiujn ni povas percepti, t. e. kiujn ni povas provi kaj kompreni. Tuj kiam ni transpasas de la sono al la lumo, ne ĉiam ni povas esti logikaj, ĉar inter la sono kaj la lumo estas certaj vibroj, kiujn ni ne antaŭvidis. Ni pasis de la sono al la lumo, sed ni pre-

terlasis certajn regionojn, pri kiuj ni ne havas ideon. Ni ekiras al la alia mondo de 32 miloj da vibroj kaj venas al 46 miloj da vibroj en sekundo — al la mondo alirebla por nia orelo, kaj ni diras: „Ĝis ĉi tie ni scias", sed irante pli malproksimen ni ĉiam estas en mallumo kaj diras: „Tion ĉi ni ne konas". Kiam ni atingas la ruĝajn radiojn, ni diras: „Dank' al Dio ni transpasis tiun ĉi dezerton". Kaj tiu ĉi dezerto okupas neimageble grandan spacon — inter du limoj de 46 miloj kaj 428 bilionoj da vibroj en sekundo. Ĉio, kion la homoj ne komprenas, estas dezerto por ili, en kiu nenio kreskas, nenio estas. Kiam Kristo parolis pri la eterna vivo, Li estis tre atenta. Li plenigis ĉiujn interspacojn, kunligas la mondojn en unu tuto: li kunligis la spiritan kun la mondo de la anĝeloj, la Dian mondon — kun la mondo de la Triunio, la fizikan kun la mondo de la homoj — de la animoj. Tial Li diras: „Mi estas la Vojo de la Vero al la vivo, Mi kunligas tiujn du mondojn kaj Mi kondukas egale al la mondo de Dio, de la Vero. Sekve, tiu, kiu Min sekvos kaj ekiros tiun vojon, kiun Mi montros al li, trovos la feliĉon por sia animo, trovos la Dian Pacon. Tial Li ankoraŭ diras: „Pacon Mi donas al vi, Mian pacon mi lasas al vi". Kaj la Paco estas ido de la Ĉielo. Ĝi estas kreita en la loĝejo de Dio. De la supredirita, ni konkludas la jenan: la Vojo — tio estas la movo de la Spirito en la apliko de la naturaj leĝoj; la vivo — tio estas la harmonia organizo de la elementoj kaj la evoluo de la fortoj en la Dia animo; la Vero — tio estas la elmontro de la Unika Dio, kiu kreas la kondiĉojn, ĉe kiuj la homa spirito kaj la homa animo povas celi ion pli bonan kaj pli luman en tiu vasta mondo.

Ni prezentu al ni la „eternan vivon" kiel fonton, kiu elŝprucas el iu monta pinto de la Dieco el sub iu ŝtonego: la akvo estas la elemento, kiu portas la vivon, la direkto de la rivero estas la vojo de tiu malsupreniro al pli malsupra mondo. Tial Kristo diras: „Mi eliris el la Vero — el Dio kaj malsupren-

venis en la materian mondon, por ke mi helpu al la homoj, por ke mi trinkigu iiin per tiu viva akvo". Tial Li diras aliloke: „Mi estas viva akvo". Tiuj tri aferoj, pri kiuj mi parolas al vi: eterna vivo, Dio, Jesuo Kristo; Vojo, Vero kaj Vivo estas kunligitaj. Se la akvo ne elŝprucas el la monta pinto kaj se ĝi ne sekvas sian vojon, pri kiu Kristo parolas, ĝi ne povas alporti la atenditajn bonojn. Kaj laŭ la vera kristana vivkoncepto ni devas troviĝi proksime al tiu ĉi fonto. La Viva Kristo estas la Fonto, nur oni devas scii kiamaniere trinki akvon el tiu ĉi fonto. Mi ne diras, ke vi ne scipovas trinki, sed vi trinkas je 500 aŭ mil kilometroj malproksime de la Fonto kaj tiam vi diras ke vi konas Kriston. Sed vi ne scias kiom da aliaj elementoj estas en tiu akvo. kiuj malserenigis ĝin kaj trompis vian guston. Vi devas ekiri supren, kontraŭ la fluo de la rivero; la vojo estas iom longa, sur viaj piedoj aperos ulceroj, sed kiam vi atingos la Fonton, vi diros: „Jen tio estas bona akvo". Kaj tiuj, kiuj ne povas atingi la Fonton, trinkas malserenan akvon; malserenan akvon ili trinkas, ĉar sen akvo estas ankoraŭ pli malbone. Mi rekomendas al vi, malgraŭ ke aperos ulceroj sur viaj piedoj, vi iru kaj trinku de ĝia pura akvo. Reveninte de tie via menso estos serena, via koro — bona kaj via koncepto pri la aferoj estos vasta. Necesas granda laboro, multaj klopodoj por ke vi povu apliki la instruon de Kristo, akiri tiujn favorajn rezultojn, kiuj iun tagon suprenigos vin, por ke vi estu civitano de la ĉielo, por ke vi vivu inter la sanktuloj kaj anĝeloj.

Nun ni denove pritraktu la temon. Kiam ni parolas pri eterna vivo en senco de senmorteco, ĉiu diros, ke tia vivo ne eblas sur la tero. Kaj vere, kiam la homo mortos, ĉu li povos akiri vivon? La konkludo estas prava, sed ne ĉiuj pravaj konkludoj estas veraj, ĉar de kie ni scias, ke la homo entute mortas? Kiam la homo ne laboris dum la printempo, somero kaj aŭtuno kaj diras: „Mi laboros dum la vintro", ni diros al li: „Vi ne havas kondiĉojn por laboro, se vi ne riĉiĝis dum la printempo, somero

kaj aŭtuno, kiel vi riĉiĝos dum la vintro? Se vi ne laboris kiam estis tempo, kiel vi akiros eternan vivon?" Eternan vivon ni povas akiri nun, hodiaŭ. Nur havu la kuraĝon de la bulgara ŝafpaŝtisto, scipovu korekte porti vian bastonon kaj manipuli bone per ĝi. La frapado, klarigita en scienca lingvo, signifas la kondiĉojn, ĉe kiuj vi povas labori, kiam antaŭ vi aperos iu malhelpo en la vivo. Vi ofte diras: „Estu tiel, kiel Dio aranĝis". Sed Dio diras, ke al tiu malkuraĝulo oni forprenos la ŝafaron, li estos sklavo, estos kiel la hebreoj en Egipto, brikojn li faros. Kaj vere, ni faras nur brikojn kaj konstruas domojn. Ni konstruas, faras domon, venas Dio kaj forpelas nin eksteren. Denove ni komencas: kvin, dek, dekkvin jarojn ni ŝparas, post kelkaj jaroj jen oni denove forprenas de ni nian domon. Kial estas tiu senutila klopodo? Mi ne volas diri al vi, ke vi ne laboru, sed tamen vi devas labori racie, ni gajnu ion, kio estas nia. Kiam mi predikas tiel, iu diros, ke mi instruas, ke vi ne laboru. Mi instruas al vi, ke vi devas labori. Tiu, kiu venis — la impostisto — forprenas vian havaĵon kaj la koron kaj ilin vendas, sed li neniam vendis la menson de la homo. Kiom da koroj, kiom da animoj estas venditaj kiel garantiaĵo. Kaj la homoj asertas, ke ili estas posedantoj. Ni vidas multajn, kiuj ne scipovas pensi, agi. Malami ili povas, sed ami — ili tute ne povas. Ĉiuj tiuj homoj per siaj malvirtigitaj mensoj kaj koroj formas karmon (ŝuldon) kaj en estonteco la tuta homaro suferos kaj ploros pro la leĝoj, kiujn ĝiaj elektitoj kreis. Tio, kio okazas en la mondo, okazas ankaŭ en ni mem. Kristo diras „Por ke la homo akiru eternan vivon, li devas pensi kaj agi korekte". Vi nun diras, ke post kiam vi revenos hejmen, vi komencos apliki la leĝon korekte. Kion vi aplikos? — Denove la malnovan leĝon. Malgranda malagrablaĵo forpuŝos vin de la reloj kaj vi forgesos la eternan vivon. La servistino ne kuiris bone la manĝaĵon kaj tuj vi komencas koleriĝi kaj kvereli, v maltrankviligas pro la manĝaĵo vian koron kaj men-

son. Ĉu vi scias, kion vi similas? Ofte la instruitoj kreadis fabelojn pri certaj okazoj. Ekzemple, iuntagon iu hundo marŝis sur iu ponto, ĝi vidis en la akvo, ke alia hundo portas, kiel li, oston, ĝi ellasis sian kaj sin ĵetis en la akvon por preni la alian oston kaj tiel ĝi perdis sian oston. Kiam vi preparas vin por la eterna vivo, havu la toleron kaj la sinregadon de tiu filozofo, kiu laboris dum 20 jaroj pri la solvo de certaj matematikaj problemoj, kiujn li notis sur paperpecetoj, kaj ne koleris al la servistino, ke ŝi, purigante lian ĉambron, ĵetis ilin en la fajron. Nun vi ofte kolektas tiujn paperpecojn, kiujn Dio skribis, dirante: „Kiaj estas tiuj ĉifonoj?“ kaj ilin ĵetas en la fajron. Kiam venos Dio kaj demandos pri tiuj paperpecoj, kion vi respondos al Li? Vi ne devas purigadi tiamaniere vian Dian ĉambron. Tiuj paperpecoj estas la diversaj centroj, sur kiuj Dio skribis multajn kaj tre valorajn aferojn por vi. Ĉion oni devas ordigi. Estas multaj disĵetitaj aferoj ĉirkaŭ la konstruaĵo, kiun Dio konstruas: estas disĵetitaj brikoj, ŝtonoj. Tiujn materialojn oni uzis por la konstruo de via nova loĝejo. Vi sola devas prepari tiun materialon. Tial Kristo diras: „Kiam vi ekkonos en vi la Unikan, Veran Dion, Kiu konstruas, Kiu estas medio, kondiĉoj kaj elemento por vi, vi akiros eternan vivon“. Kaj nun mi volas doni al vi tri aferojn, pri kiuj vi devas pensi — ili estas: medio, kondiĉoj kaj elementoj. Kiuj ne povas pensi pri tio, pensu pri tio, pri kio ili povas. Sed tiuj, kiuj pensas, provu, ĉu ili estas trempitaj en tiu medio, nomata Dio, ĉu ili havas la kondiĉojn kaj la elementojn, ĉu ilia aero estas pura, ĉu iliaj fenestroj estas malfermitaj, ĉu iliaj okuloj, lango okupas sian lokon. Tial Kristo diras: „Tiujn tri elementojn de la vivo: kondiĉojn, fortojn kaj leĝojn vi devas meti sur ilian lokon“. Tion komprenas la kristanismo kaj en tio ĉi ĝi estas fundamenta scienco por la vivo. Mi ne volas doni al vi vanan filozofion, sed mi volas, ke vi provu kaj apliku en la vivo tion, kion mi diras al vi. Kiel la mondo reboniĝos? — Ĝi reboniĝos

kiam komencos funkcii korekte. Mi rakontos al vi ekzemplon: lu homo aĉetis horloĝon, kiu post ne multe ĉesis funkcii. Li alportis ĝin al la horloĝisto kaj petis lin, ke li esploru la horloĝon, kial ĝi ne plu funkcias. La horloĝisto esploris la horloĝon kaj trovis, ke en ĝian meĥanismon eniris pediko, kiu kaŭzis la ĉeson de la funkcio. Li diris al la posedanto de la horloĝo, ke li riparos ĝin, sed se li pagos al li 10 groŝojn. Poste li enblovis en la meĥanismon de la horloĝo kaj la pediko eliris. Tuj la horloĝo komencis funkcii. — „Ĉu nur por tia malgranda komplezo vi volas de mi 10 groŝojn?" — Ankaŭ Dio venos, ekblovos kaj ĉio ekfunkcios korekte. La kristanismo estas filozofio, kiu volas liberigi la homan animon de ĉiuj ajn parazitoj. Kiam la menso kaj la koro okupos siajn ĝustajn lokojn, venos la kondiĉoj de la eterna vivo. Tiam la reviviĝo estos efektivigebla. Mi scias, ke tio estas malfacila, sed kiam oni ĝin sukcese finos, la homaro festos sian jubileon sur la tero, infanoj, gefiloj kantos la novan kanton de la vivo, ke iliaj gepatroj reformis la vivon, ke por ili jam venas pli luma estonteco; la popoloj triumfos, laŭdos kaj gloros la Bonan Dion, ke iliaj spiritaj ĉefoj, pastroj, predikantoj, instruistoj, reĝoj, ministroj ekvivis korekte kaj ke ankaŭ por ilia vivo sur la tero venas luma estonteco. Ĉiuj ekkantos novan kanton, sed kanton de la vivo, kiu elfunde tuŝos iliajn korojn kaj animojn. En tiu kanto oni rakontos la tutan pasintecon, ĝi entenos la tutan estontecon kaj ĝi esprimos la spiriton de la nova vivo. La Diaj fortoj, kiuj laŭ la Dia Volo baldaŭ aperos en la mondo kaj alĝustigos ĉiujn dismetitajn elementojn, direktos la Diajn sukojn al la homa animo, ili metos la animon en ĝian konvenan medion, kreos plej bonajn kondiĉojn por ĝia evoluo, enportos en ĝin la verajn elementojn de la vivo. Tiam nia animo suĉos tiel, kiel infano suĉas el la mamoj de sia patrino bonan, puran lakton. Tiam en nia subkonscio aperos la radikoj de la Dia Konscio kaj de tiu Dia Konscio elkreskos la trunko, elkreskos la

branĉoj, aperos la foliaro de nia memkonscio kaj de nia memkonscio aperos la burĝonoj kaj la floroj de la superkonscio — de la anĝeloj.

Kiam tio ĉi okazos, ĝi estos signo de la spirita printempo, la homa animo sin trovos en la regiono de la senmorteco, for de la ungoj de la morto, de la peko kaj de la krimo. Kaj ni kun pozitiva fido, kun pozitiva scio povas atendi la nepritakseblan riĉaĵon — la frukton de la arbo de la eterna vivo, kies folioj servos por la kuracado de la homaj kriplaĵoj kaj la frukto mem — por la subteno de la senmorteco de la homa animo kaj ĝia unuiĝo kun Dio. Kaj tiu granda okazintaĵo estas ĉe la sojlo de la hodiaŭa vivo.

Prelego farita de la Majstro je la
12. de Oktobro 1914 en Sofio.

Angel Tomov

# Nia socia idealo

Ĉu la Blanka Frataro havas socian idealon? Kiel rilatas la Frataro al la socia problemo? Jen la ĉefa demando; ĉar la socia problemo hodiaŭ estas la plej grava, kaj la plej fatala kaj kiel tia ĝi fariĝis provŝtono por ĉiuj sociaj grupoj kaj por ĉiuj socioreligiaj movadoj. La rilato al ĝi karakterizas plej klare la ideojn, la moralan forton, la esencan rolon kaj signifon de tiuj movadoj.

Ni prave kutimas trakti la blankfratanojn kiel homojn de la „alta idealo". Jen kial, kiam oni nin demandas „ĉu vi havas socian idealojn" — ni estas inklinitaj renkonti kun indulgema rideto tian demandon, kio pruvas la fundamentan nescion kaj miskomprenon de tio, kio estas plej esenca kaj plej karaktera ĉe la Blanka Frataro — la pura kaj la supera idealismo, la potenca impulso al racio en la vivo, perfekteco, supera harmonio kaj beleco. La Blanka Frataro ne nur havas socian idealon, sed ĝi estas ankaŭ la plej alta socia idealo.

Sed antaŭ ĉio, kion prezentas la Blanka Frataro de si mem?

Tio koncernas la Blankan Frataron ne nur en Bulgarujo, sed ankaŭ en la tuta mondo. Ĉiuj nuntempaj okultistoj kaj homoj de supera konsekro parolas pri la ekzisto de Universala Blanka Frataro de evoluintaj animoj kaj de estaĵoj, kiuj finis la homan evoluon kaj kies tasko estas helpi al la homaro por ĝia spirita kresko. Ĉefo de tiu Frataro estas Kristo, la viva kaj sin manifestanta Dio de la Amo. Tiu Universala Blanka Frataro estas en proksima kontakto kun la vekiĝintaj kaj kun la nun vekiĝantaj homaj animoj; multaj el ĝiaj anoj estas enkarniĝin-

taj sur la tero — gvidantoj, Majstroj, modestaj laborantoj. Per tiuj spiritaj ligoj ĉefe, konsciataj aŭ ne, en la homaron estas enportata Dia Lumo, aperas la ideoj de supera justeco, perfekto kaj belo, venas la superaj impulsoj, venas la supera vivo. La Blanka Frataro en Bulgarujo kaj sur la tuta tero estas la disĉiploj de la Universala Blanka Frataro, tio estas ĉiuj vekiĝintaj animoj, kiuj aspiras tiun superan vivon, kiu venas per tiu Universala Blanka Frataro kaj kiuj volas atingi pli superan ŝtupon de individua kaj socia perfekteco.

La Blanka Frataro staras super la limigita kaj mallarĝanima nacionalismo, ĝi — simile al la Universala Blanka Frataro — estas internacia laŭ spirito kaj celoj. Ĉi komprenas bone, ke ĉe la nuntempa stato de socia evoluo la veraj naciaj interesoj povas esti garantiataj plej bone nur laŭ la vojo de internaciaj penoj, per kreo de unuiĝinta homa socio, bazanta sin sur la principoj de la plena reciproka respekto kaj de la plej larĝa socia solidareco; ĝi komprenas, ke la veraj naciaj interesoj estas superataj de pli alta tuthomara intereso. La Blanka Frataro estas spirita armeo de homoj el ĉiuj nacioj, rasoj, profesioj, sociaj statoj; ofte ili estas unuiĝintaj ĉirkaŭ iu standardo, sed ankoraŭ pli ofte, neinterkonatiĝintaj, ne konsciantaj ankoraŭ bone siajn komunajn taskojn kaj malgraŭ ĉio formantaj armeon, malantaŭ kiu agas komuna racia komando kaj kiu armeo jam iom post iom mobiliziĝas. La Blanka Frataro en Bulgarujo estas nur malgranda avangardo de tiu granda armeo. Ne estas malproksima la tago, kiam la mondo eksentos la spiritan kaj la moralan potencon de nova internacio — tiu de la Internacia Blanka Frataro.

Kian klarigon donas la instruo de la Blanka Frataro al la socia problemo? Kiel ĝi traktas la nuntempajn sociajn batalojn kaj malvirtojn kaj kia estas ĝia socia idealo?

Se ni demandos nin pri la plej karakteriza ideo de la nuntempa mistikismo kaj de la Blanka Frataro, kiu ĝin distingas de la ceteraj religioj, ni

ne povas nei, ke tio estas la ideo pri la evoluo kaj la perfektiĝo. Ĝi regas super ĉiuj aliaj ideoj, ĝi reflektiĝas en ili. Anstataŭ difinitaj por ĉiam glaciiĝintaj formoj de la vivo, ni konstatas evoluantan unuecan en siaj mistikaj profundoj vivon, kiu kreas ĉiujn formojn, kreskigas ilin ĝis plena florado kaj evoluo, por ilin postlasi kaj rifuzi post tio, kreante pli novajn kaj pli perfektajn. La kreado ne estas mallongedaŭra akto, sed kreanta procedo sen komenco kaj sen fino. Dio identiĝas kun la universala vivo kiel eterne kreanta kaj sin elmontranta amo, kiu laŭ sia naturo elmontriĝas entute en supera racio, supera justeco, harmonio kaj beleco. La pekfalo estas ankaŭ procedo de malproksimiĝo de Dio, deflankiĝo de Lia volo kaj de Lia universala vivo kiel supera amo, justeco kaj beleco, kiel ankaŭ la saviĝo, la supreniro kaj la perfekteco estas procedoj — malaj al la unua. La fundamenta elmontro de la Dia volo laŭ la moderna mistikismo kaj laŭ la instruo de la Blanka Frataro estas la leĝo de la tutplena evoluo kaj perfektiĝo, al kiuj estas submetitaj ĉiuj estaĵoj kaj ĉiuj vivaj formoj. Tiu leĝo regas ĉion.

La leĝo de la evoluo gravas ankaŭ por la sociaj formoj. Ankaŭ tie ĉi la historio montras al ni ŝanĝiĝantajn sistemojn de socia organizo — de laboraj, sociaj kaj politikaj rilatoj: primitiva komunismo, patriarĥa socio, sklava, feŭda, burĝa, kapitalista, kolektiva (naskiĝanta nun en la sovetaj ŝtatoj).

En la procedo de la historia vivo la homo supreniĝas iom post iom. La socia problemo prezentiĝas al li tuj post la apero de la socio. Ju pli multe kreskas la ekonomia kaj la spirita potencoj de la homo, des pli multe vastiĝas kaj enprofundiĝas la socia problemo. La socio mem, kiun la homo organizas, fariĝas ĉiam pli kaj pli vasta kaj komplika. En antikva tempo la socio — tio estis la urbo; la nacia-homogena ŝtato estas ido de pli nova tempo; tamen hodiaŭ la tuta mondo estas kunligita kun tiaj intimaj ekonomiaj kaj sociaj ligoj, la socia ideo tiel vastiĝis, ke jam socio kaj homaro estas identaj.

Hodiaŭ la socia problemo aperas en plej larĝaj internaciaj kadroj; ĝi ne povas esti solvata alimaniere krom kiel internacia. Ĝi aperas kiel sintrudanta neceso por reorganizo de la tuta homaro en unusola kaj kapabla por evoluo tuto, forigante ĉiujn sociajn maljustaĵojn, kiuj malhelpas ĝian unuecon kaj evoluon. Ţiu evoluo de la socia problemo en granda skalo estas kaŝita en la esencaj kaj fundamentaj elmontroj de la vivo mem, kiu celas krei pli potencajn, pli harmoniajn, pli fortikajn kaj vivkapablajn formojn. La socia problemo hodiaŭ estas la granda tasko de la tuta homaro sur la tero — la granda tasko de la homa evoluo.

Multaj konceptas la socian problemon kiel problemon de la materia vivo, kiel problemon de la ekonomiaj interrilatoj. Tio estas limigita koncepto. La socia problemo por ĉiuj veraj mistikistoj, ankaŭ por la Blanka Frataro laŭ esenco estas spirita problemo. Ĝia plena solvo signifos triumfon de la spiriteco, de la supero en la homo kaj decida hegemonio de la efektive spiritaj homoj en la vivo — de la homoj, kiuj estas trapenetritaj de la supera amo, de la supera justeco, partoprenantaj la vivon de la tuto.

La grandaj Majstroj de la pasinteco montris ĉiam unu tuthomaran socian idealon kaj ĝi estis spirita idealo. „La Dia Regno sur la tero" pri kiu parolas la plej granda el tiuj Majstroj — Kristo — estas nome tiu idealo. „Kaj estos unu ŝafaro kaj unu ŝafpaŝtisto" — diras Jesuo kaj tiu ŝafpaŝtisto estos la viva Dio de la Amo — Kristo, kiu vivos fakte en la koroj kaj en la mensoj de la homoj kaj ilin unuigos en unu granda kaj racia tuto. Tiu Dia Regno sur la tero estas ankaŭ socia idealo de la Blanka Frataro.

La homoj solvadis la socian problemon ne nur per limigitaj teknikaj kaj sociaj rimedoj, sed ankaŭ per limigita spiriteco, per limigita kaj relativa moralo, per limigitaj komprenoj kaj per limigita ebleco partopreni la vivon de la tuto. La malsupera homo,

en kiu la besteco ankoraŭ regas, kies fundamenta movigilo estas la bagatelaj egoistaj bezonoj kaj interesoj, havis kaj havas hegemonion en la starigo de la sociaj interrilatoj kaj en la konstruo de la socia organizo. En la organizado de la socio la homo faris objekton kaj socie organizis antaŭ ĉio la malsuperecon kaj la bestecon, organizis socie sian bagatelan egoismon, la ekspluaton, la subpremon, la socian maljustecon, la malhonorigon de sia frato. Bagatelaj interesoj kaj aspiroj antaŭ ĉio kaj ne altaj tuthomaraj idealoj grupigis kaj grupigas la homojn en klasoj kaj tiuj interesoj estis kaj estas nome la fundamenta movigilo de tiuj klasoj kaj de ilia socia konstruo. Sed ĝuste pro tio la evoluo de la socio okazadis kaj ĝis nun okazas ankaŭ laŭ la vojoj de la internaj kontraŭdiroj, de la sociaj bataloj kaj kataklismoj, de la interpopolaj militoj. Ĝuste pro tio la vojo de la homaro estas forte saturita de larmoj kaj sango.

Ĉiuj ĝis nun regantaj klasoj, gvidataj de avida egoismo, atingis en sia socia kaj politika regado momenton, kiam ilia aspiro konservi nepre la akiritajn klasajn privilegiojn kaj liberojn enfalis en akrajn kontraŭdirojn ne nur kun la plej esencaj interesoj de la popolamasoj, sed ankaŭ kun la socia evoluo mem, diktanta plibonigon kaj perfektigon de la socia organizacio. Kiam ne povis aperi nova klaso el la subpremita popolo kiel portanto de ekonomia kaj politika fortoj, kiel reprezentanto de la postuloj de la socia evoluo kaj perforte forigi la privilegiojn de la reganta klaso, tiam la socio post neevitebla procedo de interna dispartiĝo — falis ĉiam sub la pereigajn frapojn de eksteraj malamikoj kaj pereis. Tiel malaperis grandaj ŝtatoj kun multcentjara civilizacio, kiel antikva Egipto, Romo, Bizantujo. Tiel falis ankaŭ Hindujo sub la jugon de ekstera politika kaj ekonomia subpremo.

En la nova tempo tamen, dank'al la komuna progreso kaj supreniĝo de la kultura nivelo de la popolamaso, la socio akiris pli grandan kapablon transformiĝi. La grandaj okcidenteŭropaj ŝtatoj trans-

pasis de la feŭda agrikultura aristokrataro al la hodiaŭa kapitalista klaso, evitante tiamaniere la pereiĝon de la ŝtatoj mem. Tiu transformiĝo okazis kun diversa rapideco, kun diversa takto kaj kun diversa akreco de la sociaj konfliktoj. Tie, kie al la necesaj sociaj reformoj kaj plibonigoj kontraŭstaris nekonvinkebla, neracia, preta al ĉio malbona volo, flanke de la privilegiitaj klasoj, tie oni venis al plej malbonaj internaj konfliktoj kaj revolucioj. Tia estis la vojo de la socia revolucio en Francujo.

Hodiaŭ — en la pli posta evoluo de la socioj — la mondo denove troviĝas en stato, kiam la interesoj kaj la privilegioj de la reganta klaso kaj ĉefe de la tiel nomata burĝaro estas en fundamenta kontraŭdiro kun tiuj de popolamasoj kaj ili fariĝis serioza malhelpo de la socia evoluo. La kapitalista klaso, kiu anstataŭis la feŭdo-agrikulturan aristokrataron en la nomo de la popolaj liberoj kaj interesoj kaj — en Francujo — proklamis la liberon de la civitano kaj havis idealistojn kiel Rousseau, Montesquieu, Diderot, Robespierre, Danton k. a. hodiaŭ atingis la momenton kiam ĝi rifuzas praktike ĉian demokratismon kaj parlamentarismon kaj gardas per plej arogaj kaj perfortaj rimedoj nur siajn privilegiojn kaj liberojn kaj unue tiujn, kiuj devenas de la privata posedo de la grandaj rimedoj de la produktado — la maŝinoj, la fabrikoj, la kampoj, la banka kaj la financa kapitalo, — kaj nome la eblecon por la ekspluatado de la socia laboro, de la spekulaciado kaj de la uzuro.

La rapida kresko de la tekniko, la amasigo de grandegaj rimedoj en la manoj de la opa homo, la eblecô, ke oni povu profiti la mizeron de la malriĉuloj kaj ĝenerale oni povu ekspluati la klopodon de la homo, atingis neimageblajn dimensiojn. Hodiaŭ la diversaj „reĝoj" de la kapitalo, estante ĉefoj de la diversaj trustoj, bankoj kaj akciaj entreprenoj, havas eblecon disvastigi la cirklon de sia agado al ĉiuj bazaroj de la mondo kaj dikti la prezojn de la internacia bazaro. Ion plu: la ekonomia forto de malmultnombra industria, banka kaj komerca aristokra-

taro plialtiĝis tiel, ke tiu aristokrataro diktas kaj altrudas siajn arogajn interesojn al parlamento, al regantoj, al gazetaro, donas direkton de la eduko, de la arto kaj gvidas ĉion por gardi siajn liberon kaj privilegion. Ĝuste tio tamen kaŭzis la komunan unuiĝon de la popolamasoj, la pereigan evoluon de la sociaj malamoj kaj konfliktoj; ili kaŭzis la grandan eŭropan militon kaj la sekvintan revolucion en Rusujo, kaj la civitanan militon en multaj eŭropaj ŝtatoj, la ribelojn kaj la revoluciojn en la koloniaj ŝtatoj; tiuj privilegioj kaj liberoj de la regantaj klasoj kaŭzis la hodiaŭan mizeran staton kun ĝiaj streĉaj armiĝoj kaj maturiĝantaj kataklismoj.

Kune kun la kresko de la ekonomia kaj politika forto de la kapitalista klaso kaj la evoluo de la tekniko aperis ankaŭ alia procedo — la kreo en la produktado mem, la rekonsciiĝo kaj la organiziĝo de nova klaso — la klaso de la dungataj laboristoj. Tiu klaso fariĝis tre granda faktoro en la produktado kaj en la socia vivo.; ĝi havas kontraŭajn interesojn al tiuj de la kapitalista klaso kaj rifuzas ĝiajn pivilegiojn kaj aŭtoritaton, pretendante, ke ĝi prezentas krom tio ankaŭ la interesojn de la socia evoluo, alte proklamante la socian juston, forigon de la klasa ekspluatado kaj de la interpopolaj premoj, internacian organizadon de la laboro kaj de la interŝanĝo kaj la kreon de kondiĉoj por paco kaj komuna progreso, tiu klaso aspiras formi sian internacian organizacion kaj organizi siajn agojn internacie. En la Unuiĝo de la sovetaj ŝtatoj, kie ĝi regas, ĝi faras neimageblajn klopodojn por meti la fundamentojn de nova socia ordo, bazante sin sur la kolektiva posedo de la grandaj rimedoj de la produktado.

Kiel ni kondutas kontraŭ la privilegioj kaj la liberoj de la kapitalista klaso, la subigo perforto kaj la revoluciaj fortoj kaj agoj? Kiel ni kondutas al la nova socia konstruo en la Sovetaj Ŝtatoj?

Kiel ĉiu socia organizacio kaj krom ~~tio~~ kiel tia bazanta sin sur maljusto kaj perforto, la nuntempa socia sistemo estas transitiva kaj se iu ajn forto povus ĝin konservi por eterne, tio signifus disfalon kaj

certan pereon de la tuta homaro. La ekonomiaj privilegioj kaj liberoj de la kapiralista klaso, kiuj kondukas al sklavigo de la popolamasoj kaj de la fremdaj popoloj, kaj kiu klaso estas en radikala kontraŭdiro kun la supera Dia Volo, kiu aspiras sin elmontri en la komuna pli posta evoluo, devas cedi lokon al la komunaj liberoj kaj rajtoj, al la dezirata Dia Regno sur la tero.

Akceptante tiun Dian Regnon kiel socian idealon kun tiu fakto mem ni signas transiraj ĉiujn sociajn formojn, ĉiujn rajtojn kaj liberojn, kiuj ne estas en harmonio kun tiu idealo, ni rifuzas ilin kiel ion por ĉiam starigitan kaj krome kiel ion „sanktan" kaj de Dio starigitan.

Tiel ni rilatas ne nur al la nuntempa socia ordo, kun ĝiaj maljustoj kaj kontraŭdiroj, sed ankaŭ al la nove kreata kolektiva ordo. Ankaŭ ĝi estas por ni transira ŝtupo al la nova idealo; ni ĝin ŝatas kiel neeviteblan eliron por la hodiaŭaj moralo, komprenoj kaj interrilatoj de la sociaj fortoj, el la malboniĝanta mizera stato. Ni ĝin ŝatas pro la pozitivo, kiun ĝi portas en si, sed same tiel antaŭe ni ĝin rifuzis pro tio negativo, kiun ĝi kaŝas en si, pro tiuj principoj de subpremo kaj socia maljusto, kiujn ĝi — kiel naskito de la perforto — portas neeviteble en si. Nia rifuzo tamen havas nenion komunan kun ĉiuj reakciuloj, kiuj ĝin rifuzas.

Starigante tian aitan socian idealon, kia estas la Dia Regno sur la tero, ni interesiĝas ne tiom pri la transiraj sociaj formoj de la homa supreniro, sed pri tiu „vera vivo", pri kiu parolas Jesuo, pri tiu vivo kiu konstruas la novon, postvivas ĉiun neperfektan formon por rifuzi kaj anstataŭigi ĝin per alia pli perfekta; ni interesiĝas pri la revekiĝo de la dieco en la homaj animoj kaj koroj, pri la revekiĝo de altaj aspiroj al homeco, frateco kaj vera amo, aŭ pri tio, kio ne pasas kaj estas fundamenta kapitalo de ĉiu socio kaj vera garantio por la komuna progreso. Ŝatante forte tiun veran vivon niaj Majstroj esprimis tiun socian idealon ankaŭ en la figuro de la perfekta homo de la Dia Regno, la plena esprimanto de tiu vivo — „la filo de Dio". „la Filo de la Lumo". Nia

fundamenta tasko en la socio estas prepari la alvenon de tiu perfekta homo kaj la evoluon de tiu perfekta vivo.

La Blanka Frataro havas ne nur sian altan socian idealon, sed ankaŭ sian propran vojon kaj siajn metodojn por la realigo de tiu idealo. Ni rifuzas ĉiujn liberojn, kiuj ne estas en harmonio kun la Dia volo kaj kondukas al sklavigo de aliaj personoj kaj popoloj. Ni ne povas esti kunlaborantoj kaj iloj de la perforto en la hodiaŭaj grandaj sociaj konfliktoj kaj bataloj. Plenumante nian laboron kaj starante malproksime de la grandaj interpuŝiĝoj, kiuj semas malamon kaj mallumon, ni montras al ambaŭ flankoj la vojon de la racia vivo, de la racia cedo, alvokante ĉiujn al homaranismo, rekonsciiĝo, tuthomara solidareco. Krom tio ni konscias, ke pro la komuna homa nesufiĉa evoluo kaj nematuriĝo, nia tempo — la tempo de la spiritaj homoj por vigla agado kaj por apliko de niaj metodoj en tia agado venos estonte, ĝi ankoraŭ ne venis. Sed tiu tempo rapide alproksimiĝas. La mondo iras neeviteble al tiaj aliformiĝoj, kiuj sorbos kaj vekos milionojn da homaj animoj kaj alvokos la vere spiritajn homojn al plej vigla kaj fruktodona agado. Laborante por la limigaj bezonoj de la hodiaŭa tago, la Blanka Frataro sin preparas ankaŭ por tiu alproksimiĝanta tago.

Lio Mio

# La Majstro

Kun granda Amo, Saĝo kaj Forto
Ĉe ni, la Benita, Li venis,
Al Dio, la Patro de ĉio kreata
Tolere konduki nin penas.

Ne estas facila ja Lia laboro,
Ĉar homoj obstinas kaj krimas,
Per vortoj kruelaj kaj mokeridantaj
La vojon Lian dornigas . . .

Sed vana estas ilia atenco,
Ĉar Dio Lin gardas kaj gvidas! —
Nur pli kompatema kaj pli pardonema
Al ni erarantoj Li venas.

Ĉar scias Li bone la Dian Leĝon,
Ke forte premataj ni estos . . .
Per grandaj suferoj kaj malespero
Al Dio gvidataj ni estos . . .

Sed granda estas la ĝojo Lia,
Se kredon kaj fidon Li vidas,
La Saĝon kaj Veron donataj de Dio
Al tiuj celantaj konfidas . . .

Kaj Amo el koro de l'homoj vekitaj
Elverŝas neĉesiĝante:
Lumigas, varmigas, pacigas, sanigas
La ĝojon al ni alportante.

Benata Vi estu, Majstro amata,
Por via granda ofero!
Subtenu Vin Dio ĉiurilate
En Via sankta afero!

Riga — Ikŝkile

Lio Mio

# Mia amo

Ĝi ne estas flamego brulanta —
Serpento venena mordanta;
Ĝi ne estas ondego ŝaŭmanta,
Ŝipiston fideman glutanta.

Profunda, profunda ĝi estas,
Kiel perlo sub maro kuŝanta;
Abunda, abunda ĝi estas,
Kiel fonto de monto fluanta.

Mildega, mildega ĝi estas,
Kiel sonĝo de pur' infaneco;
Viglega, viglega ĝi estas,
Kiel revo de ora juneco . . .

Riga — Ikŝkile

# »Nova Kulturo«

## LA ALTA IDEALO

La unua serio de biblioteko „Nova Kulturo“ entenas la jenajn numerojn:

1. LA ALTA IDEALO de P. Danov.
2. LA GRANDA LEĜO — de P. Danov.
3. KIUJ KAJ KIAJ ESTAS LA BLANKAJ FRATOJ? — de St. Vatralski.
4. LA REVEKIĜO DE LA KOLEKTIVA KONSCIO — de P. Danov.
5. LA NOVA HOMARO — de P. Danov.
6. LA UNIVERSA KAJ LA KOSMA AMO — de P. Danov.
7. LA NOVA VIVO de P. Danov.
8. LA MALLARĜA VOJO — de P. Danov.

9, 10. LA FORTOJ DE LA VIVA NATURO — de Petro Danov.

La tuta serio, bele bindita, kostas 4 sv. fr. nebindita — 3 sv. fr. aŭ ĉiu egalvaloro.

## JEN LA HOMO!

La dua serio de biblioteko „Nova Kulturo“ entenas la jenajn prelegojn de Majstro Danov:

1. JEN LA HOMO! LA TRITIKA GRENERO.
2. LA ELMONTRO DE LA SPIRITO. LA TALANTOJ.
3. LA AMO.

4 — 5. LA SONĜOJ DE JOZEF. LA LEĜO DE LA SERVADO. LA GRAVECO DE LA MALGRANDAJ AFEROJ.

6 — 7. PACO AL VI! LA NECESO EKKONI DION. KIOM DO, VIRO SUPERAS ŜAFON!
8. FARISEO KAJ IMPOSTISTO.
9 — 10. LA TIMO. LA KONDIĈOJ DE LA ETERNA VIVO.

Krom tiuj 14 prelegojn, ĉiuj abonantoj de la dua serio de „Nova Kulturo" ricevos ankaŭ la jenajn du senpagajn aldonojn:

1. RELIGIO-FILOZOFIA VIVKONCEPTO DE P. DANOV, — de Angel Tomov.

2. LA TRI FUNDAMENTOJ DE LA VIVO, — de P. Danov.

La dua serio kostas 4 sv. fr.

**Adreso:** A t a n a s N i k o l o v, poŝtkesto, 6 Burgas — Bulgarujo.


## Le Haut Idéal

Franclingva traduko de la prelego de Majstro Danov — „La Alta Idealo".

Prezo: 0.50 Svfr.

ooOOOoo

## The Great Law

Angla traduko de la prelego „La Granda Leĝo"

Prezo: 0.50 Svfr. R. M. 0.50

ooOOOoo

## Das Hohe Ideal

Germana traduko de „La Alta Idealo"

Prezo: 0.50 Svfr. R. M. 0.50

ooOOOoo

Tiujn-ĉi prelegojn de la Majstro P. Dânov oni povas mendi de: J. P a n a j o t o v, Opalĉenska, 66, S o f i o — Bulgarujo aŭ ĉe biblioteko „Nova Kulturo", poŝtkesto, 6 — B u r g a s.